SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »
5, Quai Vauban - PERPIGNAN (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

NN° 30 ————————— Jara Abono : 2 F . ——————— 3a Trimonato 1968

C.C.P. 956 28 MONTPELLIER.

°°O°°

KION NI POVAS FARI POR ESPERANTO ?
( Sekvo al artikolo de S-ro Loubic )

Temas pri personaj spertoj kaj ne ĉiuj certe ŝatos sekvi tiun ekzemplon, kiu ŝajnos ne tiel facila ol nur surporti la verdan stelon,

Mi diras do : Ne nur surportu la verdan stelon, sed ankaŭ uzu ĉiujn okazojn informi la aliajn pri esperanto.

Sed kiel , kiam kaj kiujn informi ?

Oni povas certe respondi fervore : Ĉiel, ĉiam, kaj ĉiujn sed praktike tiu respondo ne valoras ĉar ekzistas multaj cirkonstancoj pro kiuj povus rezulti malgajno por esperanto.

Cefe ni devas eviti aspekti strangulo.

Parolinta iomete pri esperantistaj travivaĵoj mi decidis geamikan parojn ekstudi esperanton. Jen ekzemplo sekvinde sed bedaŭrinde ne grandskale.

Kelkfoje personoj, demandas al mi : " verda stelo kio estas ? " Jen okazo por paroli pri esperanto, kaj laŭ cirkonstancoj iomete pli informi.

Sed mi diris ke mi havas personajn spertojn. Jen :

Mi havas aŭtomobilon kaj laŭ longe de la grandaj vojoj mi ŝatas akcepti la eksterlandajn junulojn kiuj per la maldika fingro signalas ke ili deziras veturi gaste.

Mi ŝatas ilin ĉar mi trovas internaciajn sentojn je ilia emo viziti diversajn landojn kvankam kun monujo ne plena.

Ofte tiuj vojaĝantoj ne bone scipovas francan lingvon; despli bone por esperanto !

Do mi donas al ili informilon pri esperanto en ilia nacia lingvo ( Mi havas ĉiam provizon de tiu materialo en la aùtomobilo.)

Mi pensas ke por tiuj junuloj, la fakto ke ili renkontis esperantiston en fremda lando krom tio la fakto ke ili spertis lingvajn malfacilaĵojn kaj ke la trafita esperantisto estis helpema, tiuj faktoj povas doni bonan influon.

Komprenehle mi ne povas scii ĉu rezultis gajno, ĉar se estas jesa respondo tio estos en frmda lando.

Ankaù se iuj volas fari kiel mi, certe la ekzmplo disvastiĝos en miltaj landoj kaj ni certe trovos novajn lernantojn inter la gejunuloj revenintc el eksterlando.

L.A.

-:-:-:-:-

VIVO DE LA GRUPOJ

ALES

La lernej-jaron 67- 68 ni melfermis per ekspozicio pri la diversaj utiligoj de Esperanto. Se ĝi instigis nur du personojn lerni la lingvon, ĝi tamen montris al la publiko ke Esperanto vivas kaj ke ĝi kapablas solvi problemon pri la lingvo-diverseco.

Fine de marto ni organizis la Federacian Kongreson en AIGUES-MORTES, 50 gesamideanoj partoprenis.

Nia unuagrada kaj perfektiga kursoj funkciis ĉiulunde, ili estis vizitataj de la plejparte el niaj gegrupanoj.

S-ino VILLEMIN sukcesis la Ateston pri lernado. S-ro VIGNE la Superateston kaj S-ro RAYNAUD la Kapablecon.

S-ro PELLETIER ĉeestis la 20-an jubilean kongreson de Internacia fervojista Esp. Federacio en VARNA ( Bulgario ) kaj F-ino PICAL, S-ro VIGNE, Ges-roj SANTAMARIA kaj RAYNAUD la 53-an U.K. en Madrido.

°°0°°

MONTPELLIER

Esperanto Kultura Centro
Sidejo : 5 Rue Docteur Roux.
C.C.P. Groupe Espérantiste de Montpellier
N° 1487-48 Montpellier.
Kunvenejo : Ĉiun unuan lundon de la monato, 34 Rue de l'Université je la 20 h 30.

Krom la lokaj okazaĵoj, inaŭguro de la strato de Zamenhof en Nimes kaj la kultura tago en Narbonne, kiujn partoprenis grupanoj, la vivo de la grupo estas riĉigita de la trairo de la urbo de esperantistoj sur vojo al Madrido : Sveda familio kies aŭtomobilo paneis kaj haltis ĉe la kampadejo; ĝi petis helpon de delegito por interkompreni kun la aŭtoripariston.

Karavano de junaj esperantistaj italoj tranoktis en nia urbo.

Sabaton la 22-an de junio, ni kunvenis okaze de la alveno de finna familio : ĝi prezentis al ni tre interesan filmon pri la finna vivo.

Y.V.

-:-+-:-

PERPIGNAN

La 17-an de junio, S-ino BENAZET , instruistino en Argelès sur-Mer, prelegis ĉe la Kultura Esperanto-Centro de Perpignan pri sia vojaĝo al Israel, pasintan jaron. Tiu prelego multe plaĉis al la ĉeestantaro dank'al la bona prononco de S-ino BENAZET kaj la mirindaj diapozitivoj pri la Biblia Lando.

La 27-an de julio alvenis S-ino SIENICKA, ĉarma esperantistino el pollando, kaj ŝia filino kiuj restis du tagojn en nia urbo antaŭ el foriri Hispanujon kiel gastinoj de S-ro LLECH-WALTER.

La 1-an de aŭgusto, haltis en Perpignan por tagmanĝi la itala karavano al la Madrida Kongreso. Tiu simpatia karavano gvidita de S-ro GRATTAPAGLIA, denove trairis Perpignan la 21-an de aŭgusto revenante el la U.K. Komprenenble, ĉiufoje , delegitoj de la esperanto grupo de Perpignan salutis la italajn samideanojn kaj tagmanĝis kun ili.

R.L.W.

RAPORTO PRI LA ESPERANTISTA RENKONTO EN NARBONNE
KIU OKAZIS LA DIMANĈON 12-an de MAJO en la Junuldomo

°°O°°

La 19-an de aprilo, ni ricivis invitilon el S-ro SAYAG, la nuna Prezidanto de la Narbona Esperanto-Grupo, por partopreni renkonton en Narbonne, la dimanĉon 12-an de majo, en la Junuldomo.

Tiun invitilon ricivis la respondeculoj de la grupoj el nia regiono " Langvedok-Rusiljono ".

El Perpignan, ni estis 5 : F-ino VIDAL, S-ino BARDEAU, S-ro CARDONA, S-ro TARASSA kaj mi mem.

Ge-roj LOUBIC kaj SAYAG afable akceptis nin kaj la antaŭvidita programo komencis je la 10-a kaj duono.

Unuatempe, S-ro DELIGNE el Narbonne ( esperantisto de nur unu jaro ) prelegis pri Kamboĝo kaj montris al ni mirindajn diapozitivojn pri la Budapreĝejoj, la Akvo-Festo, la Genio-Festo, la Dragono-Festo kaj la surtrunugo de la gepatroj de la Princo " Norodom Sihanouk ". Post la prelego, en perfekta esperanto-stilo, ni povis admiri ekspozicion pri la kamboĝa arto precipe argentaj iloj ( tabakujo, cendrujo, manĝilaro; kombilo, spegulo, k.t.p. )

Post S-ro DELIGNE, venis la vico de F-ino TERRAL el Beziers kiu montris al ni filmon esperanto-parolatan pri Ĉeĥoslovakio kiun ŝi mem verkis dum vizito al sia korespondanto.

Je la unua horo ni tagmanĝis ĉe restoracio sufiĉe proksima de la Junuldomo, restoracio nomata " Heliko " . Ni sufiĉe bone manĝis po 12 F sed, ĉiam dum bankedo, oni devas bedaŭri la malrapidecon de la servico, tamen ne gravas, dum oni atendas la sekvantan manĝaĵon oni gaje babilas kun siaj najbaroj.

Kiel la vetero ne estis bela, posttagmeze, ni reiris al la Junuldomo kie denove F-ino TERRAL montris filmon pri Langvedoko ĉiam esperanto-parolatan.

Mi forgesis diri al vi ke S-ro CABRIER, estonta esperantisto el Narbonne, kantis por ni - dum la deserto- la famekonatajn kantojn : " Sankta Luĉia ", " Granada ", kaj " La Tosca ", en esperanto.

Je la 5-a vespere finiĝis la renkonto kaj ĉiuj revenis hejmen post agrabla tago en Esperantujo. Dankon kaj gratulojn al la grupo de Narbonne por tiu amika kaj bone organizita renkonto.

M.V.

# 53-an U.K. EN MADRIDO

La 53-an U.K. finiĝis. Vi legos en la esperanta gazetaro raportojn pri ĝi. Mia celo ne estas rezumi la multajn interesajn okazaĵojn ĉar aliaj kongresanoj faros tion pli bone ol mi.

Mi volas nur informi vin pri du aferoj kiuj aspektas al mi kiel la plej gravaj, kiujn instruis al mi la kongreso.

1°- Pluraj radio-elsendoj okazas regule. ( La lasta plibonigo : Varsovio elsendas tri fojojn tage esperantan programon )

Pri tiuj elsendoj, ni fieras kaj konscias pri ilia graveco. Tiuj okazas dank'al laboroj kaj klopodoj de obstinaj esperantistoj. Sed ni nepre devas helpi ilin. Kial kaj Kiel ?

La respondeculoj de la programo de radio-elsendoj, daŭrigas elsendojn, ( kiujn ajn : esperantajn aŭ ne, muzikajn, religiajn, variajn k.t.p. ) nur se ili ricevas de la aŭskultantaro sufiĉe multajn leterojn pri ili. Do la devo de ĉiuj esperantistoj estos aŭskulti kelkajn el la esperantaj radio-elsendoj ( kies liston kaj programon vi trovos en la esp.gazetaro ) kaj skribi ( nur poŝtkarto sufiĉos ) pri ĝi, ĉu pri la bona aŭ malbona aŭdeco, pri la enhavo ĉu plaĉa, ĉu malplaĉa ? k.t.p.

2°- Ni havas veran aud-vidan metodon por lernigi esperanton. Laŭ mi tio estas tre grava ĉar nun ĝi estas la laŭd-moda metodo por lerni alilandajn lingvojn. ( oni eĉ asertas ke francoj povas lerni la anglan lingvon nur dum 6 monatoj ! do kiom da tagoj por esperanto ? )

Ni estu seriozaj ! Tiu metodo estas vere alloga, kaj povas allogi modernajn personojn.

Por ĉiuj informojn sin turni al

S-ro A. SEKELJ
Kondina 24
BEOGRAD Jugoslavio

Y.V.

A T E N T U !

La kotizojn U.F.E. 1969 devos esti verŝajne altigitaj. Estas prefere ke vi atendu plian informon por sendi viajn kotizojn.

La abono al SudFranca-Stelo resta ne ŝanĝita.

Sendante viajn kotizojn nepre sciigu la aĝon de junuloj malpli ol 25 jara.

Tiu informo estas necesa por nombri la junulojn. Ĝi restos konfidenca.

°°O°°

La 5-an de majo okasis en Nimes inaŭguro de strato ZAMENHOF.

°°O°°

Verŝajne 10 federacianoj partoprenis la Universala Kongreso en Madrid. Samideanoj el Budapest Ges-roj BERENY vojaĝis de Nimes al Madrid kun S-roj JANNEZ kaj ANGEVIN, kaj de Madrid al Nimes kun S-ro VIGNE.

°°O°°

DEPARTEMENTA FEDERACIO : HERAULT

Kun plezuro ni informas vin ke ni ricevis al la " Conseil General " sufiĉe gravan subvencion. Tio plivigligu nian agadon !

==========================================================

Ronéotypé par la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
DIRECTEUR de la publication : Lucien ANGEVIN. 30 LE CAILAR.

==========================================================